

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2019-04-15 ĝis 2019-07-15.

Vivo de la Ligo; eventoj

70-jariĝo de ILEI grava jubileo

La 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio estos okazo memori pri la lumaj momentoj de la vivo de la Ligo. Festa vespero okazos en formo de ludvespero. La enhavo de la revuo IPR jam komencis raporti pri la vivo de la Ligo.

ILEI preparis por la UK-anoj en Lahti buntan programon por marda tago, kiu estas la Tago de la Lernado. Estos prezentata analizo de la laboro de multaj aktivuloj, inter kiuj estas membroj de ILEI: Renato Corsetti, Duncan Charters, Monika Molnar, Ilona Koutny, Katalin Kovàts kaj aliaj. Mireille Grosjean provos skizi la atingojn de la Ligo, ĝiajn fortojn kaj lamaĵojn. Ne nur instruistoj, sed vasta publiko ĝuos tiun varian programon, starigitan de ILEI-ano kaj komisiito pri agado de ILEI kadre de UK Marija Belošević. La nomo de la Tago estas “70-jara komunumo instruas por floranta (inter)kulturo”.

La Estraro

Estrarkunsidoj per “zoom” funkcias tre bone. Junie fare de la kasisto William Harris estis preparitaj buĝeto de ILEI por 2020. La lasta estas modesta kaj ŝparema. La Komitato traktos ĝin en Ĉaĉak.

La Komitato

Per reta voĉdono nia supera instance aprobis la protokolon de la kunsidoj de 2018 en Madrido.

Estas preparitaj 3 gravaj dokumentoj de la Ligo kun modifproponoj por la komitatkunsido en Ĉaĉak dum la kongreso. Temas pri la regularo pri reta voĉdono, la regularo pri Honoraj Membroj kaj la kongresa regularo.

Kapabligo

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI kaj *Edukado.net*, denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon EIT. La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua okazos 14-20 sept. 2019, la dua 01-07 feb.2020) kaj intertempan hejman laboradon, retajn taskojn kaj konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj fine pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2020. Aliĝantoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado. Ĉiuj dezirantoj estas bonvenaj!

EIT – Esperanto-Instruista Trejnado

5 kandidatoj daŭrigas la studadon en Afriko per la Reto kaj per forta subteno de D-ino Katalin Kovats. En preparo estas buĝeto por prepari la ĉeestan parton, kiu kronas la studadon.

Reeldono de Manlibro pri Instruado de Esperanto.

Denove la forta kontribuo venas de Katalin Kovats, kiu akceptis esti redaktoro de tiu valora verko. Helpo venas de nia vic-prezidanto Ivan Colling kaj de lia edzino Rita. Okazis malfruoj en la liverado de la kontribuoj, tiel ke ni devis rezigni pri printado antaŭ la juliaj kongresoj, ĉar ni celas kvaliton kaj preferas iom atendi kaj liveri al la Movado valoran ilon.

Universitata agado

Tre ĝojiga estas la laboro de la ILEI-Komisiono pri universitata agado. Multaj kontaktoj inter universitataj profesoroj naskiĝis tra la mondo. Fine de UK en Lahti okazos kunsido de kvardeko de ili pro subteno de Esperantic Studies Foundation ESF.

Kongresoj

La 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio

Por la 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak la Estraro detale prilaboris la tagordon por la Komitatkunsido. Bunta programo pretas. Dutaga universitata Konferenco okazos kaj malfermos nian kongreson al lokaj instruistoj: valora paŝo al la ekstero.

Hodiaŭ 16-an de julio la prezidanto jam sendis du gazetarajn komunikojn pri la disvolvado de la Kongreso. Ili legeblas sur la ĉefpaĝo de www.ilei.info ĉe novaĵoj.

Venontaj kongresoj

2020. La preparlaboroj kun skipo en Kebekurbo (Kanado) efike antaŭeniras. Ŝajnas bona solvo, ke UK kaj ILEI-Kongreso okazu samlande. La estraro decidis pri la kongresa temo: « Interlingvistiko en universitatoj ».

2021. Estas traktata demando pri la loko por la ILEI-kongreso antaŭ aŭ post UK en Belfast, Norda Irlando.

Sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj

Danke al la laboro de Stefan MacGill ni havas detalan liston de niaj sekcioj; ĝi aperas nun en nia retejo, kies aspekto iom progresas.

Internacia Pedagogia Revuo (IPR)

Regula aperritmo, varia enhavo. La laboro de la redaktoro Jozefo Nemeth daŭre brilas.

Juna Amiko (JA)

Daŭras forta diskuto pri la revuo ene de la Estraro de ILEI, skipo de JA kaj aliaj koncernaj personoj. Jam sonis multaj, ofte kontraŭaj opinioj kaj proponoj. Tiu aktiveco, certe, estas pozitiva kaj donas esperon al solvo de la financa kaj abona situacio de la “juvelo” de ILEI. Estas planata vasta reklamkompanjo dum BET-55 en Litovio kaj UK en Lahti. Planata estas ankaŭ vasta diskuto dum la kongreso en Ĉaĉak.

Kunlaboro kun UEA

Daŭre estis traktata inter la Estraroj de ILEI kaj UEA la iama propono pri rabatita kotizo por la partoprenontoj de ambaŭ kongresoj.

Estis decidita kaj preparata, ke dum la 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak estos organizita la 58a AMO-seminario kun la temo: “Esperanto – kiel konigi ĝin, kiel instrui ĝin.”. Inter la gvidantoj estos la Prezidanto Mireille Grosjean pri la agado de ILEI kaj UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko kaj la vicprezidanto de UEA Stefan MacGill – pri la unika verbsistemo de Esperanto kaj kiel instrui ĝin.

Kontaktoj kun aliaj enmovadaj institucioj

Ni finfine solvis la problemojn por ebligi al niaj blindaj kolegoj la legadon de niaj du revuoj.

Nia prezidantino sendis salutmesaĝon al la Kantfestivalo en Vroclavo, Pollando, al instruista kunveno en Kievo, Ukrainio, al IJK en Slovakio kaj al SES, Somera Esperanto Studado en Slovakio ankaŭ.

Kontaktoj kun ekstermovadaj institucioj

ILEI kandidatiĝis ĉe organizo de Eŭropa Unio, reto de Ministerioj kaj Agentejoj, kiuj laboras por globala edukado en Eŭropo. Nia prezidanto Mireille Grosjean proponis laboron inter diversaj klasoj laŭ du aksoj: unu lernado de du fremdaj lingvoj paralele: la hispana kaj Esperanto, pere de Duolingo; due konstruado de reta forumo en formo de virtuala lernejo “Tibor Sekelj”. Ni vidos, ĉu la ideo plaĉos al la ĵurio.

Dankoj

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Mireille Grosjean

2019-07-16